Regularo pri la «Eminenta rusia instruisto de Esperanto (de la lernojaro...)»

Akceptita de la 30-a Konferenco de REU, setlejo Carina Lago (Tiĥvina distrikto), 17.07.2019.

1. La proklamo de la Eminenta rusia instruisto de Esperanto (laŭ la versio de Rusia Esperantista Unio) celas:
   - atentigi la rusian esperantistaron pri la graveco de la popularigo, disvastigo kaj instruado de Esperanto kiel unu el la bazaj celoj de REU;
   - rekoni kaj plialtigi la rolon de instruantoj de Esperanto en Rusio;
   - honori plej elstarajn perantojn de Esperanto, kiuj atingis distingindajn rezultojn ene de unu lernojaro, kaj publike aprobi ilian agadon kaj instruspertojn.
2. 2.La proklamo de la Eminenta rusia instruisto de Esperanto koncernas precipe kvar ĉefajn kampojn en la instruista agado de ĉiu kandidato:
   - instruado de Esperanto en Rusio en diversnivelaj kursoj;
   - daŭra patronado de kursfinintoj;
   - diskonigo de propraj instruistaj spertoj;
   - verkado kaj publikigo de materialoj pri instru-metodika kaj lingvistika temoj.
3. La lernojaro estas instruperiodo, kiu komenciĝas en aŭgusto de la antaŭa jaro kaj finiĝas en junio de la posta jaro.
4. La Eminentan rusian instruiston de Esperanto proklamas la Estraro de REU ĉiujare en junio, konsiderante la rezultojn de la pasinta (ĵus finiĝinta) lernojaro.
5. Kandidatojn nomumas membroj de la REU-Estraro, prezentante al la Estraro koncizan noton pri la proponata kandidato. La estraranoj rajtas nomumi po unu kandidato.
6. La Estraro elektas la Eminentan rusian instruiston de Esperanto el inter individuaj membroj de REU, membroj de aliĝintaj kolektivoj de REU aŭ personoj, kiuj ne membras en REU, sed meritas la honoran titolon.
7. La Eminenta rusia instruisto de Esperanto estas elektata de la estraranoj el la nomumitaj kandidatoj per relativa plimulto de la voĉoj. Se rezulte de la nomumado estas nur unu kandidato, la estraranoj voĉdonas por tiu kandidato.
8. Kandidatigante instruanton de Esperanto por la honora titolo «Eminenta rusia instruisto de Esperanto de la lernojaro...», la estraranoj devas konsideri praktikajn rezultojn kaj atingojn de la kandidato en la pasinta lernojaro:
   - sukcese gvidita(j) baza(j) kurso(j) de Esperanto en Rusio;
   - sukcese gvidita(j) progresiga(j) aŭ altŝtupaj kurso(j) de Esperanto en Rusio;
   - daŭra patronado de finintoj de la baza kurso cele de ilia sukcesa esperantista enkomunumiĝo aŭ preparo de ili al pli altŝtupa lingva ekzameno;
   - diskonigo de instruspertoj fare de la kandidato per organizo, okazigo de instru-metodikaj seminarioj, metiejoj aŭ aktiva partopreno en similaj aranĝoj; informado pri kursoj per dissendolistoj, Esperantaj revuoj, asociaj bultenoj kaj tiel plu;
   - akurata raportado al la Estraro de REU pri atingoj dum la lernojaro;
   - verkado kaj publikigo de artikoloj pri instru-metodika kaj lingvistika temoj en rusiaj kaj internaciaj periodaĵoj.
9. La eminenta rusia instruisto de Esperanto ricevas honorfolion, subskribitan de la Prezidanto de REU, librodonacon kaj senpagan jaran re-aliĝon al REU.
10. La eminenta rusia instruisto de Esperanto povas esti ne proklamita, se entute neniu persono estos kandidatigita de la membroj de la Estraro.